# Sud-Rejna Kuriero

Novembro 2016

Komuna inform-bulteno de
**Esperanto-Societo Basel kaj Mulhouse-Esperanto**

N°64

Espace 110
FR-68110 ILLZACH
CCP 19684 F Strasbourg
mulhouse.esperanto11@free.fr

Esperanto Societo Basel
Postfach 178
CH-4005 Basel
esperantobasel@gmx.ch

*Karaj membroj, karaj gesamideanoj, karaj legantoj,*

*En ĉi-tiu numero vi trovos raportojn pri okazintaj eventoj en somero kaj ankaŭ laste en aŭtuno.*

*Pri Nitro en Slovakio rakontas Ginette pri siaj personaj travivaĵoj kaj spertoj.*

*En Germanio okazis ekskurso kaj vizito al elektro-centralo sur la Rejno. Tute laste la regiona staĝo en Rastatt kun interesaj prelegoj.*



*Fotita en Katalunio*

*La semajno en Katalunio ebligis ankaŭ ĝui agrablan someran veteron eĉ en oktobro. Tie ankaŭ la prelegoj estis aparte interesaj.*

*Jam aperas novaj okazoj renkontiĝi kaj ĝui Esperanton. Ĉi-jare nia grupo transprenis la organizadon de la 3-landa Zamenhof-festo, tamen ĉi-foje en la proksimeco de Colmar Wintzenheim kun la helpo de Edmond kaj Michel.*

*Grava evento en Colmar en venonta majo: nia grupo kunlaboras por la organizado de la venonta IFEF-kongreso en majo 2017. Sam-okaze kaj sam-loke nia grupo proponas okazigi la 81an regionan staĝon. Aliĝilo kaj programo troviĝas en ĉi-tiu numero.*

*En nia kalendaro vi jam trovos la datojn por la verdaj fadenoj, la 3-reĝa festo kaj nia Ĝenerala membro-kunveno.*

***Al ĉiuj ni deziru agrablajn jarfinajn festo-tagojn.***

*André Grossmann*

## Programo 2016

ESPERANTO - SOCIETO BASEL

| | | |
|---|---|---|
| **Ĵaŭde** | **17.11.2016** | **Monata kunveno : Programo** |
| **Sabate** | **10.12.2016** | **Zamenhofa-Festo en Francio proksime de Colmar, Wintzenheim/La Forge. Informoj en ĉi-tiu numero** |

## Programo 2017

| | | |
|---|---|---|
| **Ĵaŭdo** | **26.01.2017** | **Ĝenerala jarkunveno 2017** |
| **Lundo** | **27.02.2017** | **Verda fadeno en Porte-de-France, Saint-Louis** |
| **Jaŭdo** | **23.03.2017** | **Monata kunveno : Babilado** |
| **Lundo** | **24.04.2017** | **Verda fadeno en Porte-de-France, Saint-Louis** |
| **Ĵaŭdo** | **18.05.2017** | **Monata kunveno : Grün 80 /Blauen** |
| **Lundo** | **26.06.2017** | **Verda fadeno en Porte-de-France, Saint-Louis** |
| **SOMERA PAŬZO** | | |
| **Ĵaŭdo** | **28.09.2017** | **Monata kunveno : Somero** |
| **Lundo** | **30.10.2017** | **Verda fadeno en Porte-de-France, Saint-Louis** |
| **Ĵaŭdo** | **23.11.2017** | **Monata kunveno : Programo** |
| **Sabato** | **09.12.2017** | **Zamenhofa festo en Svislando** |

Aktualigitaj informoj aperos daŭre ĉe:

**http://mulhouse.esperanto.free.fr**

Niaj membroj ankaŭ estos informitaj per nia dissendo-listo:

**mulhouse-esperanto@yahoogroupes.fr**

Por babili en Esperanto ni uzas jenan dissendoliston:

**verda-babilejo@googlegroups.com**

Enskribiĝo: per mesaĝo al mulhouse.esperanto11@free.fr

# Rigardo al la Svisa Esperanto-kalendaro

## **Novembro** 2016

7-an de novembro 2016, 20h00: Laŭzano, Espace Dickens (Rue Dickens 6): Kunveno de Laŭzana Esperanto-Societo

7-an de novembro 2016, 18h00, Ĝenevo, en la restoracio le Galicia, rue des Gares 21: Lunda babila grupo, kiu ĉefe celas komencantojn

14-an de novembro 2016, 18h00, Ĝenevo, en la restoracio le Galicia, rue des Gares 21: Lunda babila grupo, kiu ĉefe celas komencantojn

19-an de novembro 2016, 10h00: La Chaux-de-Fonds, CDELI, Urba Biblioteko: Studsabato de CDELI (vidu pli)

21-an de novembro 2016, 18h00, Ĝenevo, en la restoracio le Galicia, rue des Gares 21: Lunda babila grupo, kiu ĉefe celas komencantojn

24-an de novembro 2016, 20h00. Zuriko en Kafejo Mandarin (apud Stacidomo Stadelhofen): Libera kunveno kaj kafoklaĉo (vidu pli)

28-an de septembro 2016, 19h00-20h30, Mulhouse (apud Bazelo), Kafejo Le Printemps, rue du printemps: Verda Fadeno

28-an de novembro 2016, 18h00, Ĝenevo, en la restoracio le Galicia, rue des Gares 21: Lunda babila grupo, kiu ĉefe celas komencantojn

## **Decembro** 2016

3-an de decembro 2016, 18h00: Ĝenevo, Salon Castafiore, 20 rue Montbrillant, vid-al-vide de la parko Cropettes, 10-a Kasta Festo.

5-an de decembro 2016, 18h00, Ĝenevo, en la restoracio le Galicia, rue des Gares 21: Lunda babila grupo, kiu ĉefe celas komencantojn

7-an de decembro 2016, 19h00: Flawil en b'treff (apud la stacidomo Flawil): Tradicia rakledovespero de la Esperanto-Klubo Wil.

12-an de decembro 2016, 18h00, Ĝenevo, en la restoracio le Galicia, rue des Gares 21: Lunda babila grupo, kiu ĉefe celas komencantojn

15-an de decembro 2016, 20h00. Zuriko en Kafejo Mandarin (apud Stacidomo Stadelhofen): Libera kunveno kaj kafoklaĉo (vidu pli)

17-an de decembro 2016, 10h00: La Chaux-de-Fonds, CDELI, Urba Biblioteko: Studsabato de CDELI (vidu pli)

19-an de decembro 2016, 18h00, Ĝenevo, en la restoracio le Galicia, rue des Gares 21: Lunda babila grupo, kiu ĉefe celas komencantojn

## Januaro 2017

9-an de januaro 2017, 18h00, Ĝenevo, en la restoracio le Galicia, rue des Gares 21: Lunda babila grupo, kiu ĉefe celas komencantojn

16-an de januaro 2017, 18h00, Ĝenevo, en la restoracio le Galicia, rue des Gares 21: Lunda babila grupo, kiu ĉefe celas komencantojn

21-an de januaro 2017, Friburgo, Instituto por Plurlingviso de la Universitato: Ĝenerala Kunveno de Svisa Esperanto-Societo (detaloj sekvos)

23-an de januaro 2017, 18h00, Ĝenevo, en la restoracio le Galicia, rue des Gares 21: Lunda babila grupo, kiu ĉefe celas komencantojn

26-an de januaro 2017, 20h00. Zuriko en Kafejo Mandarin (apud Stacidomo Stadelhofen): Libera kunveno kaj kafoklaĉo (vidu pli)

30-an de januaro 2017, 18h00, Ĝenevo, en la restoracio le Galicia, rue des Gares 21: Lunda babila grupo, kiu ĉefe celas komencantojn

## Februaro 2017

6-an de februaro 2017, 18h00, Ĝenevo, en la restoracio le Galicia, rue des Gares 21: Lunda babila grupo, kiu ĉefe celas komencantojn

13-an de februaro 2017, 18h00, Ĝenevo, en la restoracio le Galicia, rue des Gares 21: Lunda babila grupo, kiu ĉefe celas komencantojn

20-an de februaro 2017, 18h00, Ĝenevo, en la restoracio le Galicia, rue des Gares 21: Lunda babila grupo, kiu ĉefe celas komencantojn

27-an de februaro 2017, 18h00, Ĝenevo, en la restoracio le Galicia, rue des Ga-

# Bunt und fröhlich: Baden-württembergisch-ostfranzösisches Esperanto-Seminar in Rastatt, 4.-6.11 2016

Es war ein schönes Wochenende für 44 Leute in dem Wohlfühl-Bildungshaus St. Bernhard in der geschichtlich erinnerungsträchtigen Stadt Rastatt. Umgangssprache dabei: Esperanto.

Im hiesigen Schloss wurde vor dreihundert Jahren bei den Friedensverhand-lungen von Rastatt der Grundstein gelegt für den Aufstieg des Französischen und den Abstieg des Lateins als Diplomatensprache. Und dies deshalb, weil der französische Verhandlungsführer Villard nicht genügend Latein konnte und deshalb auf Französisch im Abschlussdokument bestand, statt des damals üblichen Lateins. Er fürchtete nämlich, sonst bei den Verhandlungen von den sprachgewandteren Diplomatenkollegen der Gegenseite über den Tisch gezogen zu werden. Diese Sprachregelung wurde fortan bei allen Friedensverhandlungen angewandt, und das gute alte Latein hatte das

Nachsehen. Wer weiß denn schon, dass es heute wieder Leute gibt, die Latein als Alltagssprache pflegen? Hallo, ihr Lateinlerner, das wäre doch was für euch, oder nicht? Jedenfalls lernt man eine Sprache leichter, wenn man sie auch spricht. Das wissen alle modernen Sprachendidaktiker, und viele Lateinlehrer/innen fangen heute wieder an, den Lateinunterricht in gesprochener Sprache zu gestalten.

Die Esperantosprecher wissen das sowieso. Sie sprechen ihre Sprache beim Frühstück, Mittagessen und Abendessen und auch dazwischen. Jedenfalls war das so im Bildungshaus St. Bernhard am vergangenen Wochenende. Das Badische Tagblatt, Lokalredaktion Rastatt, hörte davon, schickte eine Mitarbeiterin zum Lauschen und berichtete darüber. Frau Zerrath die Lauscherin, ist in Personaleinheit auch Besucherführerin im Riedmuseum Ottersdorf. Ihre spannenden Ausführungen über die Rheinbegradigung im 18. Jahrhundert durch den badischen Wasseringenieur Tulla, und die daraus entstandenen wirtschaftlichen Vorteile, aber ökologischen Schäden, wurden gleich in lebendiges Esperanto übersetzt, damit auch die teilnehmenden Französinnen und Franzosen alles haarklein mitbekommen können. Denn die Rheinbegradigung betriff sie natürlich auch.

Was da sonst noch alles war in St. Bernhard? Vier Kleinkinder sprangen fröh-lich durch die Gänge des einstigen Gymnasiums, Gottesdienste gab es auf Esperanto und einen Vortrag über das Esperanto-Kirchengesangbuch.

Die Erinnerung an den Friedensschluss zu Rastatt durfte natürlich nicht fehlen, der einen dreizehnjährigen Welt-Krieg der frühen Neuzeit beendete. Abends gab es einen Tanzkurs auf Esperanto, neue Lieder in dem „neuen Latein“ Esperanto, das doch so viel leichter zu lernen ist als das alte. Spiele gab's und Sketche, und zum Ausklang traf man sich in der „knajpo“, wo man sich natürlich auch die Witze in der gemeinsamen Umgangssprache erzählte, damit beide Muttersprachler; die Franzosen und die Deutschen, mitlachen konnten.

Die Esperanto-Leute beschäftigen sich nicht nur mit sich selbst. Neben zwei Vorträgen darüber, wie man die zauberhafte 129 Jahre junge Verkehrssprache bekannter machen könnte, ging es auch um Zusammenarbeit mit afrikanischen Esperanto-Freunden. Mramba Simba, „Ober“-Bürgermeister zweier Verbandsgemeinden in Tansania, bittet um Unterstützung beim Erweiterungsbau seiner Mittelschule und für die Operation kranker Kinder. Seine Esperanto-Freunde in Baden-Württemberg halten Kontakt mit ihm in der „Nichtkolonial-Sprache“ Esperanto und unterstützen ihren Freund bei seiner bewundernswerten Entwicklungsarbeit.

Rastatt steht für „Kriege beenden“ und für „Zusammenarbeiten“. Es war eine fröhliche und fruchtbare Fortbildungsarbeit im Bildungshaus St. Bernhard.

Alois Eder

## Esperanto – Societo Basel Ĝenerala jarkunveno

**Ni invitas vin por ĵaŭdo la 26.01.2017 al la Ĝenerala Jarkunveno, en nia kunvenloko en Riehenring 131**

**Komenco je la 17h**

| | | |
|---|---|---|
| 1. | Bonvenigo | |
| 2. | Elekto de la tagprezidanto | |
| 3. | Protokolo de la Ĝenerala Jarkunveno 2015 | |
| 4. | Aliĝoj kaj eksiĝoj | |
| 5. | Raportoj | a) de la prezidanto |
| 6. | | b)de la kasisto kaj kaskontrolantoj |
| 7. | Senŝarĝigo de la estraro | |
| 8. | Elektoj | a) de la prezidanto |
| | | b) de la vicprezidanto |
| | | c) de la kasisto kaj kaskontrolantoj |
| | | d) de la sekretario |
| 9. | Kontribuoj | a) al CDELI |
| | | b) al pacmovado |
| 10. | Proponoj | |

**Tiujn bonvolu skribe prezenti ĝis la 16-a de januaro 2017 al Esperanto Societo Basel.**

**Esperante, ke vi multnombre partoprenos, ni salutas vin samideane.**

**La estraro**

**Kiel kutime ni aldonas enpagilon por la jarkotizo al tiuj personoj kiuj ne aktive partoprenas en nia rondo, la aliaj bonvolu pagi rekte al la kasisto. Anticipan dankon.**
**Membro unuopa CHF 25.-**

# JARRAPORTO 2016

Kiel ĉiu jare, raporto estas la okazo trarigardi la aktivecojn de la jaro :

En januaro okazis nia Jarkunveno en  Riehenring 131, kie estas vere ege agrable kunveni.

En februaro ni kunsidis en agrabla rondo denove en Saint-Louis, ĉe la restoracio “La Poste” kaj bone diskutis.

En marto ni babilis kviete dum la monata kunveno.

En aprilo “Verda fadeno“ ŝanĝis la restoracion en Saint-Louis, nun la kunveno okazas en la restoracio “Porte de France“, kie ni havas apartan salonon. Tiel la kunvenoj estas pli agrablaj, ĉar estas malpli da bruo kaj oni pli bone povas interkompreni unu la alian.

En majo ni kunvenis en la restoracio 'Grün 80' en Münchenstein. Estis tre agrabla rondo kun gastino el Koreujo kiu loĝas en Francio.

En junio, ni denove kunvenis en la restoracio “Porte de France“ en Saint-Louis kaj babilis agrable kune.

Post la ferioj la temo de la septembra monata kunveno estis pri niaj someraj aktivecoj.

En oktobro refoje ni renkontiĝis kun niaj samideanoj el Saint-Louis kaj ĉirkaŭaĵo en la restoracio  “Porte de France” en Saint-Louis por agrabla babilado .

En novembro ni denove kunvenis por fari nian programon, kiu plej ofte gardas pli/malpli la samajn temojn, sed eblas facile ŝanĝi ilin.
En decembro estos la Zamenhofa festo en Gunsbach kaj La Forge apud Colmar. (informoj kaj aliĝilo en ĉi-tiu numero)

**Nicole Béroud**

# German-franca Esperanto-ekskurso al Iffezheim, river-centralo franc-germana

**Kunvive, ne milite, la homaro prosperas**

Sabaton, 24.09. 2016, Esperanto-amikoj el ambaŭ najbaraj landoj, Germanujo kaj Francujo, kune vizitis la rivercentralon Iffezheim [ifechajm]. La ekskurso fariĝis leciono pri la politika decido de Germanujo ĉesi la uzon de atomcentraloj.




La centralo de Iffezheim duon-duone apartenas al franca kaj al germana energi-entreprenoj, samkiel la najbara centralo en Rheinau-Gambsheim [rajnaŭ-gambshajm]. Ebligis tion la franc-germana amikec-kontrakto de 1963, konkretigita per kontrakto pri komuna uzo de la lim-rivero Rejno en 1969. Iffezheim liveras kurenton al Germanujo, Rheinau-Gambsheim al Francio.

La politika volo en Germanujo decidi por “atomeliro”, tio estas ĉesigo de atomcentraloj, maturiĝis post la atom-katastrofo en Fukuŝimo, Japanujo, en 2011. Obstakloj kontraŭ la realigo de tiu vast-horizonta politika decido kuŝas ĉefe en la bezono konstrui minimume kvar novajn longdistancajn kaj potencajn kurent-lineojn



por transporti la elektron de la ventcentraloj en la Norda kaj la Balta maroj al la dense enloĝitaj kaj industri-riĉaj regionoj en okcidenta kaj suda Germanujo. La vojo al interkonsento pri la situo de la traceoj postulos ankoraŭ multe da tempo.

Multajn detalojn lernis la vizitantoj, por povi saĝe kundiskuti en la politika diskurso pri la energi-estonteco.

Grandan atenton kaj admiron de la gastoj trovis la funkcio de la "fiŝpasejo" , ankaŭ nomata "fiŝ-ŝtuparo" Salmoj frajas en la montaro. La salmidoj migras riveren ĝis la salakvo de la Norda maro. Seksmaturiĝinte ili retromigras al sia naskiĝejo en la montaro. Tiu biociklo interrompiĝis pro la rejn-bariloj. La fiŝo-ŝtuparo konsistas el serio de basenetoj, en kiuj la salmoj kaj aliaj fiŝoj dum sia suprennaĝado povas ripozi por poste rapidege spurtnaĝi supren tra katarakto interbasena. El observeja ĉambro enrivera la vizitantoj povas spekti la fiŝojn tra vitra fenestro.

Spekti la fiŝojn subakve kaj stari sub la giganta turbino enrivere, tiuj du travivaĵoj estis por la raportanto la plej impresaj momentoj de la vizito.

Vigla diskuto ekestis per detalaj demandoj, en kiuj partoprenis kaj la francaj kaj la germanaj ĉeestantoj. La du ŝtatoj havas tre malsimilajn energi-politikojn. La inĝeniero preleganta kaj gvidanta ĝojis pri la granda ekologia kaj politika intereso de la vizitantoj. Same, ne mem estante Esperanto-parolanto, li miris pri la plena taŭgeco de Esperanto transporti fakajn enhavojn en la interpretado.



Konkludoj el la tago – unue: lim-rivalecoj solveblas, due: homoj kapablas pace kunvivi kun siaj kunkreitaĵoj. Por kio ja la homo havas sian inteligenton, se ne por solvi defiojn? Bona volo necesas.

Alois Eder

*Letero de Engelbert Sester:*

*Saluton – Mi volas la malebligitojn nun informi, ke nia renkontiĝo en Iffezheim estis absoluta sukceso. Aperis multe pli da partoprenantoj ol mi supozis -ni estis geamikoj el kvar landoj – la suno brilis – la etoso bonis – la prelegon tradukis Alois Eder – plej novajn lumbildojn ni vidis kaj multajn demandojn, ankaŭ de eksterlandaj geamikoj, respondis la preleganto kaj gvidanto. Estis unika okazaĵo.*

*Sekvis la irado al la prielektra kontrol-stacio, la promenado al la turbinoj, al la purigejo de la akvo antaŭ la turbinoj kaj poste al la "fiŝ-ŝtuparo". Tiun ni vidis de ekstere kaj de ene tra fenestro. Dekojn da fiŝoj ni povis observi, tio feliĉigis ĉiujn.*

*Post la manĝo kaj kafumado ni veturis al la pramo de Plittersdorf. Tie ni ĝuis la senmotoran pramveturadon trans la Rejno al Francio kaj baldaŭ reen, post klarigoj tie. Kelkaj tiam adiaŭis dum aliaj veturis al gastejo proponita de Jochen Wagner, kie ni manĝis regionajn krespojn (nomitaj "Flammkuchen", laŭvorte "flamigitaj patkukoj)". Ni ĝuis ilin denove kaj denove, ĝis ni estis plenplene sataj.* *Engelbert*

# MULHOUSE ESPERANTO

Espace 110
1, avenue des Rives de l'Ill
68110 ILLZACH
Francio

mulhouse.esperanto11@free.fr
Tel. 33/3.69.54.46.93
Retejo: http://mulhouse.esperanto.free.fr

Invitas vin al la

# Zamenhof-festo

10-an de decembro 2016

**Kontakt-adreso:**
S-ro Edmond LUDWIG
26, route de la Schlucht
68140 STOSSWIHR
<esperanto.eludwig@orange.fr>
33/3 89 77 52 56
Retejo:
http://mulhouse.esperanto.free.fr

**Rendevuejoj:**

| | |
|---|---|
| 10a30 | Gunsbach domo de Albert Schweitzer |
| 12a | Restoracio en La Forge por la tagmanĝo |
| 13a30 | Festa programo en tiu restoracio |

Karaj geamikoj,

La ĉi-jaran tri-landan Zamenhof-feston organizas la grupo de Mulhouse-Esperanto. Ni kore invitas vin al tiu jara aranĝo, kiu donos al la respektivaj grupoj de Frajburgo, de Bazelo kaj de Mulhouse refoje la eblecon renkontiĝi.

Ankaŭ gastoj ekster tiuj grupoj estas varme akceptataj.

Edmond Ludwig kaj Michel Basso iniciatis la organizadon en la ĉirkaŭaĵo de Colmar kaj deziris doni al vi la eblecon viziti:

**la domon/muzeon de la fama teologo, filozofo, orgenisto kaj ĝangala doktoro Albert SCHWEITZER en Gunsbach (Vilaĝo antaŭ Munster)**

# Provizora Programo por la ZF-2016:

10a30 **Unua rendevuo**: en la vilaĝo Gunsbach (antaŭ Munster)
**Vizito al la domo/muzeo de la fama teologo, filozofo, orgenisto kaj ĝangala doktoro Albert SCHWEITZER**
por gvidata vizito: 5 € Ekde 20 vizitantoj, 4 €

Koordinatoj: 48.046301 7.172658
N 48° 2' 46.684" E 7° 10' 21.569"

12a **Dua rendevuo:** Restoracio **Le val Munster Brasserie** (03 89 71 12 16) en Wintzenheim/La Forge: (La vilaĝeto La Forge troviĝas je 3 km post Wintzenheim).

Koordinatoj: 48.059044 7.231265
N 48° 3' 32.558" E 7° 13' 52.554"

**Menuoj:**
Laŭ persona elekto por ne-vegetaranoj kaj vegetaranoj

**13a30 Programo de la festo:**

- **Prelego de Roberto KUENY: Iia ĉi-jara vojaĝo tra Irano - Deklamado de iranaj poeziaĵoj.**
- **Prezento de la aranĝoj en 2017: Nia printempa staĝo en Colmar kadre de la IFEF-kongreso**
- **IFEF-kongreso en Colmar**
- **Prezento de la Germana Kongreso en Freiburg (Pentekosto 2017)**
- **Komuna kantado kun muzika akompano**
- **Lernado de nova esperanto-himneto**
- **Frandado de kuko + kafo**

**16-a horo: Por la interesataj samideanoj: Reveturado al la Domo de la fromaĝo en Gunsbach**
**Gvidata vizito al la domo**
**Tarifoj: 5,90 € (ekde 10 personoj: 4,90 €)**
**Ebleco vespermanĝi por la frandemuloj en la endoma restoracio.**

Aktualajn informojn pri la Zamenhof-festo
eblas trovi en nia retejo:
**http://mulhouse.esperanto.free.fr**



**La domo/muzeo de la fama teologo, filozofo, orgenisto kaj ĝangala doktoro Albert SCHWEITZER**

| Aliĝo al Zamenhof-festo en Wintzenheim/La Forge | | |
|---|---|---|
| Bonvolu informi pri via partopreno, kiel eble plej baldaŭ, prefere antaŭ 1a de decembro al Edmond LUDWIG esperanto.eludwig@orange.fr Tel. 03 89 77 52 56 | | |
| Nomoj: | | |
| Adreso: | | |
| Telefono: | Ret-adreso: | |
| Nombro da personoj por : | | |
| Alvenas per trajno en Colmar | je la | per aŭto je la |
| Viaj preferoj pri vizitoj | la muzeo de Albert Schweitzer ☐ | La domo de la fromaĝo ☐ |
| Manĝo en la restoracio | nevegetara ☐ | vegetara ☐ |
| Eventuale ie | vespermanĝi ☐ | |

La tuta grupo de **Mulhouse-Esperanto** esperas, ke vi venos multnombraj por ĝui agrablan tagon en amika kaj internacia etoso.
Por faciligi nian laboron kaj la rezervadon, vi bonvolu informi nin pri via partopreno. Se vi estas grupo, informu nin pri la nombro de la partoprenantoj kaj pri la preferataj menuoj. Tio multe helpos nin.




**La restoracio Le val Munster Brasserie en La Forge**







**la Domo de la fromaĝo en Gunsbach**

# La barbiroj ne ĉiam prizorgis nur barbojn kaj harojn

En la mezepoka komenco nur la ekleziuloj, tiu-tempe preskaŭ la solaj kleraj homoj, praktikis kirurgion. Ĉar ili bezonis helpon, ili alvokis la barbirojn jam spertaj pri la ne tre gravaj kirurgiaj operacioj, kiel la dento-eltirado. Sed iom malfrue, pro bibliaj antaŭjuĝoj, la katolika eklezio decidis kondamni tiun medecinan arton. En 1163 la koncilio de Tours (Francio) dekretis "ecclisia abhorret a sanguine" (eklezio abomenas la sangon). Tuj kirurgio rang-malaltiĝis, kaj en 1215 dum la "latran-a kongreso" ĝi eĉ iĝis malpermesita. Tiam, pli-malpli kaŝite, la barbiroj proprigis al si (kelkefoje kun foiraj komercistoj) tiun diablan arton. Sed iom post iom, saĝo triumfanta super nescio, la kirurgoj, tiam dirite de "longa robo", estis re-honorigitaj, dum la barbistoj, ili nur de "mallonga robo", konservis ankaŭ kelkajn jarcentojn unu el siaj privilegioj: la dento-eltirado.



Pri tiu dento-afero kelkaj landoj malfacile eliris el la mezepoko. Kaj tio estas la kazo de Hispanio, kie ankaŭ dum la frankista epoko barbistoj rajtis eltiri la dentojn.

Jen amuza hispana anekdoto memorigante al ni la kompatindajn barbistojn, kiuj iam ludis "en la kirurga korto" kaj fine perdis sian mallongan robon.

"Eniras bravulo dentistejon, por ke oni eltiru el li karian denton. Freŝa dentist-komizo, ankoraŭ malmulte lerta, kaj iom stulta, enkondukas en la buĉon de la paciento sian prenilon, kaj elŝiris la putran denton kaj alian apudan sed sanan. Hai! Hai! stultulo, ekkris la kompatindulo, vi ĵus eltiris du dentojn, nekredeble!

"Malpli laŭte! malpli laŭte! murmuras tra siaj dentoj la komizo, al la pacienta orelo, vidu, ke se mia mastro aŭdas vin, li vin pagigos la duoblon" .

Jacques

# Ginette rakontas pri siaj travivaĵoj okaze de UK en Nitra, Slovakio 2016

*Je la alveno, unue mirigis min la agrabla akceptemo fare de junaj helpantoj. Trajneto (kvazaŭ lud-trajneto por turistoj) prenis nin en la bus-stacio de Nitra ĝis la kongresejo, kiu aspektis kiel kosmoŝipo, sed tiu modernaĵo staris meze de naturo; baseno kun akvo-ŝprucilo, kanoj kaj anasoj apudis.*



*Belaj afiŝoj kaj flagoj en la kongresejo, kaj ĉie en la urbo, donis la impreson, ke grava evento prepariĝas.*

*Mi malkovras mian ĉambron en studenta domo, ni trairas verdan parkon por iri tien. Por la momento mi estas sola, mia kunĉambranino Vida venos nur malfrue vespere. Post duŝo, mi manĝas la restaĵojn el mia sako kaj iras malkovri la urbon. Ne tro fore, oni trovas gigantan magazenon kun eksponaĵo de impresaj sablaj artaj verkoj; tie oni povas aĉeti panon, lakton, fromaĝon, fruktojn, sed ĉio estas skribita en la slovaka lingvo, do ofte aĉeto estas kvazaŭ loterio.*

*Poste mi vizitas la libro-servon, kiu estas agrable freŝa kaj trankvila. Post nokto en la buso, mi tre deziras ripozi kaj tio estas la taŭga loko.*

*Ĉie la salonoj estas lumo-plenaj pro multaj fenestroj, el kie oni vidas arbojn kaj herbojn de la parko, vere bona medio por agrikultur-faka universitato. Mi ekscias, ke Nitra enhavas 80 000 enloĝantojn, sed aŭtune kaj vintre aldoniĝas 2000 studentoj. Urbo verda, agrabla, juna, vivo-plena.*




*Revenante de la libro-servo, kiu estas iomete distanca, mi troviĝas en la movada foiro, kiu jam zumas kiel abelujo kun svarmanta publiko; la suna vetero ebligis eksteran prezentadon apud la kongresejo. La etoso estas ege ĝoja, ĉar meze de la giganta u-forma foiro, kelkaj muzikas, dancas kaj klaŭnas. Ne-kredebla sukceso! la kongreso bone komenciĝas.*

*Revenante al la studenta loĝejo, mi iom perdas min sur la padoj sed (la hazardo favoris nin) bela junulino saltas al mia kolo kaj kisas min.*

*Aneta! kia ĝojo! (juna polino, kiu estis mia kunĉambranino en Bjalistoko, kaj kiun mi ne vidis de multegaj jaroj). Tio estos la unua ne-atendita renkonto. Poste, tiuj ne-atenditaj renkontoj estos tiom oftaj, ke mi eĉ ne plu emociiĝos, la ĉiutaga miraklo de surprizaj renkontoj iĝos banalaĵo. Banalaĵo sidi en koridoro aŭ en buso apud gravuloj de la movado kaj paroli kun ili kvazaŭ familiece! Jes, mirakloj estis banalaĵo, ni baniĝis en magia mondo. Post la kongreso, mi kalkulis, ke mi babilis, almenaŭ rapide salutis, kun kvardek karaj homoj.*



*Ĉie estas benkoj kaj seĝoj en koridoroj aŭ sur la herbeja korto, facilas ie ajn sidi kaj diskuti. Eĉ necesejoj estas relative multaj kaj facile troveblaj (ne nur mi notis tion).*

*Poste mi devas trovi la lokon, kie okazos la nacia festo. Per donita mapo en la sako, mi decidas, ke mi iros ne tra la urbo-centro, sed per alia flanka strato pli verda. Sen tro da problemoj mi trovas la grandan placon; feliĉe, ĉar mi estas akompanata de japanoj, al kiuj mi asertis, ke mi bone gvidos ilin; kutime mi facile perdigas la homojn, kiuj sekvas min.*

*Giganta nombro de seĝoj atendas nin sur la granda placo, ankaŭ kelkaj gardistoj, sed ili ne havos problemon kun la spektantaro. Ĉio estas perfekte organizita.*

*Poste, kio sekvis estis nekredebla. slovakaj dancistoj dancis ege energie, vigle, eĉ haltigis mian spiron.*

*La loka loĝantaro ĉeestis kun ni. Multaj teatraĵoj kaj prelegoj okazos dise en la urbo dum la tuta semajno kaj estos alireblaj por la loka loĝantaro. Kiom da ili profitis? en la kongresejo mem, mi ne scias, sed en la eksteraj manifestacioj, certe multaj urbanoj aldoniĝis al ni, kiuj jam estis sufiĉe videblaj (entute pli ol 1200 personoj enskribiĝis).*

*La prelegoj, ĉiuj interesaj, plaĉis al mi, ĉefe la rakonto pri "ŝtelistoj aŭ savintoj?". Temis pri ĉinaj trezoroj rabitaj antaŭ tre longa tempo fare de eŭropanoj kaj japanoj. Ĉu ili ŝtelis aŭ savis ilin, ĉu ili devos redoni ilin? Mi tre ŝatis la konkludon. "Se la muzeoj ne kaŝas ilin, sed montras ilin bele kaj videble al la publiko, ili rajtos konservi la "ŝtelitaĵojn". Se la trezoroj dor-*



*mas funde de keloj, ili devos redoni ilin al la "priŝtelita lando".*

*Plaĉis al mi la rakonto pri la fluganta aŭtomobilo. La inĝeniero, kiu inventis ĝin, estas slovaka. Li montris la filmon de la unua flug-provoj. Li parolas slovake kaj estas tuj perfekte flue tradukita en esperanton.*

*Plaĉis al mi la paroligaj kursoj de Sylvain, ĉiam amuzaj, en la parko sur benkoj kaj sub arboj.*

*Plaĉis al mi aliaj diversaj aferoj, en kiuj mi ĉeestis preskaŭ hazarde: ĉen-danco en koridoro kun Martin Stride, diversaj kunkantadoj kun E-familio, kantado de opero-kantistoj diskutoj en koridoro kun Jasuo Hori kaj kun Trevor Steele.*

*El "renkontoj kun aŭtoroj", mi ĉeestis nur tiun de Spomenka, kiu elektis la temon "amo en esperanta literaturo". Ŝi estis iom devigata paroli pri kroataj aŭtoroj, inter aliaj verkistoj, ĉar ŝi ricevis monhelpon de la kroata ŝtato, sed ŝi ne havis penon por trovi bonajn kroatajn aŭtorojn, kiuj poemas pri amo. Ho, pardonu, mi perdiĝas en detaloj.*

*"La vojaĝo al Budapeŝto, kiu okazis dum la libera merkredo, estis tre interesa, ĉar en la buso mi babilis kun la viro apud mi, li estis pakistanano. Aliflanke, Katalin, kiu estis la organizantino, ĉe mikrofono multe parolis al ni, kaj klarigis*



*multe, ofte ridigis nin. Ankaŭ la vizito al la ekzamen-centro, kun provekzameno (sen notoj) por ĉiuj, estis amuza afero. Ankaŭ la vizito al studento-restoracio estis bona, ĉar ni manĝis bone malmultekoste. Dum reveno tra Budapeŝto, la buso ruliĝis tre tre malrapide pro la trafiko, sed, danke al tiu malrapida maniero, ni povis ĝui ĉiujn mirindaĵojn de la urbo, eĉ povis foti el la buso. Poste ni iris sur monteton, admiris la urbon kaj la riveregon, kaj ĉirkaŭiris piede la supron. Ne kredeble bela estis la vidaĵo al la urbo. Finfine ni vidis multe el Budapeŝto,*



*kaj komforte vidis ne laciĝante. Ni ĉiuj revenis iom malfrue sed tre kontentaj, tuj por la fino de junulo-aranĝo  Pro frua reven-vojaĝo, mi ne ĉeestis la lastan vesperon, dum kiu, laŭ la ricevitaj fotoj, okazis granda, impresa, entuziasma defilado de esperantistoj sur la stratoj, sekvata de dancoj sur la placo.*

*Ankaŭ la futbal-matĉo, kiun mi ne ĉeestis, estis pli sukcesa ol la antaŭaj. Mankis nur unu golo por egali la alian teamon.*

*Por resumi, kongreso juna, dinamika, suna, malferma al la ekstera publiko kaj tre bone organizita, kiu certe donos fruktojn.*

*Ginette*

# La 24-a Internacia Esperanto-Semajno de la kulturo Kaj Turismo en Cambrils, Katalunio




Ĉi-jare de la 1a ĝis la 8a de oktobro okazis la Esperanto-semajno en Katalunio kaj arigis 84 partoprenantojn el 13 eŭropaj landoj. Ĝi okazis en Cambrils, sude de Barcelono. La hotelo disponigis apartan salonon por la Esperanto-aktivaĵoj. En la hotela restoracio ni ĝuis bufedajn manĝojn ege abundajn kun hispanaj vinoj.

Tamen la ĉefa organizanto Luis Serrano, jam 90-jara, pro malbonfarto, ne povis ĉeesti la semajnon. Tial la ceteraj kunhelpantoj devis iom improvize adapti la programon de la semajno kaj solvi diversajn problemetojn. Malgraŭ tio la tuta semajno agrable disvolviĝis. La planitaj prelegoj estis aparte interesaj. Krome, iuj partoprenantoj iom spontane iniciatis vesperajn programojn por kompensi mankojn..



Dimanĉe okazis la solena inaŭguro de la Semajno en ĉeesto de la skabenino pri kulturo de Cambrils. Ŝi bonvenigis la ĉeestantojn kaj deziris sukceson kaj agrablan restadon en Cambrils. Pli poste ekstere de la hotelo apud la naĝejo okazis komuna fotado en ŝia ĉeesto.



Refoje Rodica Todor el Rumanio transprenis la gvidadon de konversacia kurso kaj lerte sukcesis instigi la partoprenantojn al viglaj diskutoj pri diversaj temoj rilate al la organizado de Esperanto-asocioj, ĉu daŭre laŭ tradicia formo kompare kun la evoluanta tekniko pri komunikado per la reto, dissendo-listo, retejoj ktp.

Kvar grupoj aparte kune debatis, iuj pri avantaĝoj, aliaj pri malavantaĝoj. Sed entute evidentiĝis, ke niaj asocioj kun eble malpliiĝinta membro-nombro devas iel diversigi la aktivaĵojn uzante novajn rimedojn por komuniki, informi, allogi kaj entute adaptiĝi al la evoluanta mondo. Volonte ni aŭskultis la sintezon de aliaj grupoj.



Dufoje la partoprenantoj estis invititaj al tradicia tiel nomata "interkonatiĝa vespero" dum kiuj estis proponitaj vinoj, kataluna ŝaŭmvino kaj manĝaĵetoj.

Aparte interesa estis la tut-taga ekskurso al fora montara urbo Morella. Tie surloke eblis viziti la muzeon pri dinosaŭroj. Por atingi la supran kastelon necesis suprengrimpi la montoflankan kaj







poste ŝtuparon kun 99 ŝtupoj por atingi la supron.

Okazis aparte interesaj prelegoj. Gian Carlo Fighiera rakontis kaj klarigis pri la Norda Mitologio, pri "Sigfrido kaj la Nibelungoj".



Ĉeestis Peter Zilvar kaj Szofia Kóródy, el la Esperanto-urbo Herzberg. Ili respondecas pri la Esperanto-Centro tie. La Esperanta biblioteko en Herzberg estas nun unu el la plej grandaj en la mondo kaj enhavas ne nur librojn, sed ankaŭ gazetojn, filmojn, diskojn, eĉ insignojn kaj aliajn memoraĵojn. Ili uzas la Centron por kursoj, renkontiĝoj kaj multaj aliaj aferoj.



En la lasta vespero ĉiuj estis invititaj al kuntrinkado de la ŝatata "cremat", bruligita rumo kun aldonaj spicaĵoj. La specifaj tasoj de la ĉi-jara semajno estis eĉ donacitaj al ĉiu ĉeestanto.

La semajno finiĝis en agrabla amika etoso. Ni gratulis la kunhelpantojn kaj taksis la semajnon pozitiva. Ĉiuj deziris, ke ankaŭ en venonta jaro ĝi okazu, eble kun renovigita skipo. Ĝi kompreneble devos akurate aktualigi la koncernan retejon por informi kaj allogi eĉ pli da samideanoj.



Tekstoj kaj fotoj de Andreo

# 80a regiona staĝo kaj 38-a BAVELO-Seminario 4a - 6a de novembro 2016 en Rastatt

La aŭtuna staĝo de Esperanto-France-Est kaj la seminario de Bavelo okazis komence de novembro en Rastatt iom apud la centro de la urbo.

La partoprenantoj estis agrable akceptitaj en la domo St.Bernhard, vere tre moderna kaj komforta kleriga domo. La salonoj kaj ĉambroj estis tute taŭgaj al la diversaj programeroj de tiu staĝo.



Post la vendreda vesper-manĝo Jochen proponis ludojn por simpatie interkonatiĝi. Plej interesa estis la ludo por diveni vortojn evitante "tabuajn vortojn".



Liliane kaj Catherine prezentis skeĉon pri la papago kaj la sanitaristo.

La vespero finiĝis en kela salono, la knajpo, en amikaj rondaj kun biero aŭ aliaj trinkaĵoj aŭ manĝaĵetoj.






La sabata programo proponis en la bukeda kurso prelegojn pri la *Milito pro la hispana sukcedo.* Alois Eder bone sukcesis komprenigi la situacion en tiama epoko, kiam la ĉefa zorgo de la ŝtataj potenculoj estis konservi kaj eĉ plivastigi sian potencon.  Ludoviko la 14a ja ne zorgis pri la bonfarto de la enloĝantoj, sed senzorge elspezis la monon de la ŝtato pro sia propra lukso kaj potenco kaj militis tiacele. Tiatempe la geedziĝoj celis plifortigi la influon per akiro de novaj teritorioj.

Fora konsekvenco de tio estas interalie la plifortiĝo de la angla lingvo.




Post la paŭzo prelegis Lu Wunsch pri la interesa temo: **Sukcese komuniki kun ĵurnalistoj.**

Li prezentis multajn rekomendojn por respondi al la demandoj de publiko aŭ ĵurnalistoj. Ofte ili starigas demandojn pro nescio kaj misinformiĝo. Tamen tiam ne indas "militi" sed korekti la erarojn kaj prezenti la Esperanto-realon.




Li ankaŭ detale klarigis kiel plej oportune akcepti ĵurnalistojn okaze de iu evento.

Dum tiuj ege interesaj prelegoj okazis en aliaj salonoj kursoj por komencantoj kun Roland Wetzel, por progresantoj kun Martin Ptasinski. Paroliga kurso kun Edmilson Serejo.





Malgraŭ pluva vetero, okazis la vizito al muzeo pri la regiona vivo kaj ankaŭ pri la laboroj faritaj por rektigi la Rejnon en 19a jarcento, kiu siatempe havis multajn meandrojn kaj kaŭzis oftajn inundojn. Iuj vilaĝoj tute malaperis, ĉar ili estis tiom ofte inunditaj, ke neniu plu rekonstruis sian domon samloke.

La komuna foto estis konsekvence farita ene de la domo.



Reveninte al la domo eblis ĉeesti la prezentaton de libroj novaj kaj malnovaj el la Libro-servo, kiun prizorgas Jean-luc.

Sabate vespere distris nin loka esperantistino Brigitte, kiu akompanis la kantadojn per sia gitaro. Poste Jochen proponis danc-kurson kaj instruis la paŝojn kaj figurojn de Rumba.

Dimanĉe prelegis Bruno Flochon kaj klarigis kiel okaze de UK en Lillo estis farita la propagando al la loka publiko. Necesis buĝeti por akiri bekaspektajn banderolojn, informpanelojn, afiŝojn, prospektojn. Vere profesia laboro. Amaso da gazetoj estis kontaktitaj, informis radioj kaj ĉefe belgaj televidoj. Okazis koncertoj en la urbo kaj partoprenis ĉirkaŭ okdeko da homoj al la proponitaj rapidkursoj pri Esperanto.



*Entute agrabla semajnfino en komforta domo. Dankon al la organizantoj.*

# Verdaj fadenoj por amike babili en Esperanto




La 26an de septembro okazis nia unua verda fadeno de la nova lernojaro.

Jacques proponis alian restoracion en Rixheim (anstataŭ tiun en Mulhouse) ĉe la aŭtoŝosea elirejo.

La Pataterie, rue de l'Aérodrome Rond-point de La Piscine - A35, 68170 RIXHEIM.

Tie la parkejo estas vasta kaj facile atingebla.



Tiu nova loko ŝajne taŭgis al la partoprenantoj. La menuoj estas variaj, ne nur kun terpomoj.

Jen la kalendaro de venonta verdaj fadenoj.

- 28an de novembro en Rixheim  La Pataterie, rue de l'Aérodrome Rond-point de La Piscine - A35.
- en decembro estas paŭzo.
- 30an de januaro 2017 en Rixheim  La Pataterie, rue de l'Aérodrome Rond-point de La Piscine - A35.
- 27an de februaro en la restoracio "Hotel-Restaurant Porte de France", 94 avenue de Bâle, Saint-Louis.

Vi estas varme invitataj ilin partopreni por havi la okazon aŭdi Esperanton kaj tute amike babili kun la partoprenantoj.



En Saint-Louis ĉe la svisa land-limo, tute proksima al Bazelo, la restoracio disponigas al nia grupo trankvilan salonon. La 31an de oktobro tie kunvenis 9 personoj el Francio kaj Svislando.

Viglis la diskut-temoj pri venonta Zamenhof-festo organizita en la proksimeco de Colmar/Wintzenheim, kaj ankaŭ pri pli foraj Esperanto-aranĝoj en venonta printempo.

Bertrand iom klarigis pri la uzo kaj avantaĝoj de fejsbuko por informi kaj interkonatiĝi. Niaj venontaj rendevuoj estos por deĵori okaze de la ekologia foiro en Ungersheim. Bédéciné en Illzach okazos samtempe, sed ĉi-jare ne eblos tie deĵori pro drastaj sekurecaj kialoj.

## Prepar-kunvenoj en Colmar por la venontmaja IFEF-kongreso







De la 25a ĝis la 27a de oktobro venis al Colmar deko da komitatanoj de IFEF kaj kelkaj membroj de nia asocio por prepari kaj interkonsenti pri la venontjara IFEF-kongreso, kiu okazos en Colmar de la 16a ĝis la 22a de majo. En la lasta tago okazis ankaŭ vizito al la fervojista muzeo de Mulhouse.

Ankaŭ estis akceptita, ke samtempe kaj samloke okazu nia regiona staĝo de vendredo al dimanĉo. Informoj kaj aliĝilo en ĉi-tiu numero.

# MEDITERANEA
# ESPERANTO-SEMAJNO 2017

**Restadejo Val d'Esquière – Les Issambres – Francio (Lazura Marbordo)**

**4 - 11an de Marto 2017**

**Ĉu ankoraŭ frostas en via regiono ? Tuj venu al la Mediteranea Maro, kie floras mimozoj kaj migdalarboj ! Vin atendas amika familia etoso, belegaj pejzaĝoj, bona ripozo kaj lazura maro...**

Aliĝkotizo: 60 eŭroj (familia aliĝkotizo: 100 eŭroj)

**INFORMOJ KAJ ALIĜOJ** :

**Monique Prezioso**, 92 allée des Harkis, FR 83700 Saint-Raphaël, prezmoni@hotmail.com - tel. 0033 (0)4 94 83 06 88
**Christine Graissaguel**, Les Iles d'Or, rue du Progrès, FR 83600 Fréjus Retadreso:kris_grai@hotmail.fr - tel. 04 94 95 66 18

## ĜENERALAJ INFORMOJ

**Alveno :** De la stacidomo St Raphaël: aŭ per **buso n° 7601 al Saint-Tropez** ĝis haltejo ***Le Val d'Esquière Les Issambres***, aŭ per taksio.

**Akcepto :** sabaton la 4an de Marto je la 15a horo - **Fermo :** sabaton la 11an de marto je la 14a horo.

**Kurs-horaroj :** 9.00 ĝis 12.00 kaj 18.00 ĝis 19.00

**Partopreno en kursoj (3-nivelaj) :** Elektu vian deziratan kurson en la ĉi-suba tabelo.

**Liberaj posttagmezoj por :** bankuracado en proksima marakva banejo (800m), vizitado de Fréjus (klostro), Saint-Raphaël (muzeo), Nico, Menton, Maures-monteto (mimozo kaj piedekskursado), Saint-Tropez, Sainte-Maxime, Bormes-les-Mimosas, bazaro en Ventimiglia (Italio, nur vendrede), ktp.




**Ne forgesu viajn marŝŝuojn por pied-ekskursi sur montetaro.**

**Distraj vesperoj** far la hotelo, Esperantaj prelegoj, kantoj, skeĉoj... Kunportu viajn amuzajn kanzonojn, ludojn, ktp.

Eblas bankuracadi en proksima mar-akvo-terapiejo.

# ALIĜILO AL M.E.S. 2017

| partopre-nanto | Nomo/persona nomo | Naskiĝ-jaro | Kurso |
|---|---|---|---|
| 1a | | | |
| 2a | | | |
| 3a | | | |

Adreso

Telefono: ____________________ Ret-adreso: @

Mi loĝos ĉe Résidence Le Val d'Esquière: ¨ jes /ne

Mi partoprenos de la 4a de Marto ĝis la 11a de marto 2017 : jes / ne

**Sendu al Christine Graissaguel** (vidu adreson ĉi-apude)

**ALIĜKOTIZO** (ne repagebla) :

☐ Plenkreskulo : 60 € ☐ Paro : 100 €

(senpaga por la malpli ol 18-jaraĝuloj)

**LOĜADO**

☐ Kompleta semajna restado (plenkreskulo) : ....... x 360 € = .......... €

☐ Rabatebleco por infano (bv informiĝi) : x --- € = ......... €

☐ Suplemento por unulita ĉambro:) : .................... x 110 € = .......... €

☐ Mi volas mem partopreni en programo per :

ALVENO

☐ Trajne (St Raphaël) ☐ Fluge (Nico)

☐ Memveture je la .............horo.

EVENTUALA MESAĜO VIA :

| kursoj | Kursgvidantoj | Niveloj |
|---|---|---|
| 1 | Nina | Komencanto |
| 2 | Marek BLAHUS | Parolanto |
| 3 | Dalia PILECKIENE | Diskuto/analizo |

RESUMPAGO

Aliĝkotizo .......... €

Restado .......... €

TUTA SUMO .......... €

Sumo pagebla :

- **per ĉeko** je la nomo de "Esperanto club St Raphaël-Fréjus", sendota kun aliĝilo al: *Christine Graissaguel, Les Iles d'or A, rue du Progrès, FR 83600 Fréjus, Francio)*
- aŭ **per bankoĝiro** al : Société Marseillaise de Crédit IBAN: FR76 3007 7049 3926 6980 0020 041 BIC: SMCTFR2A ESPERANTO-CLUB- 83700 ST RAPHAEL

espéranto France-Est

**En amikaj rilatoj kun BAVELO invitas vin al la :**

# 81a Regiona Staĝo de Esperanto
## la 19 - 20 - 21ajn de majo 2017
## en la hotelo Primo Balladins
## 5 rue des Ancêtres 68000 COLMAR

Nia ĉi-jara regiona staĝo okazos en Colmar, en la kadro de IFEF-kongreso, la internacia kongreso de la fervojistoj. Ni povos ĝui la samajn programerojn de vendredo ĝis dimanĉo de tiu kongreso.
La surloka organizado estas prizorgata de la grupo de Mulhouse kun turisma gvidado fare de Edmond Ludwig.
Por la distra vespero ni ĝuos la koncerton de Grazia Barboni el Italio.
Krome estas ankaŭ ebleco aliĝi al la ekskursoj de la postkongreso.



**Por pliaj informoj :**
andreo.ag16@free.fr
Tel. 03.69.54.46.93
poŝtel. 07.82.21.97.34
**Daŭre aktualigitaj informoj:**
http://esperanto.alsacelorraine.perso.sfr.fr


La aliĝ-kotizo entenas la partoprenon al elektita kurso aŭ prelego kaj al la distra vespero.



Eksterlandaj partoprenantoj ricevos senpage nian bultenon **La Informilo** dum unu jaro.

| ALIĜOJ | |
|---|---|
| Ĉef-aliĝanto abonanta "La Informilo"n aŭ loĝanta ekster Francio | 30 € |
| Ĉef-aliĝanto ne abonanta "La Informilo"n kaj loĝanta en Francio | 46 € |
| Kun-aliĝanto (sama adreso kiel ĉef-aliĝanto) | 18 € |
| Junulo inter 10 kaj 25 jaroj | 12 € |
| Infanoj malpli ol 10 jaroj | 3 € |
| Krom grava evento, la aliĝkotizo ne estas repagebla. | |

La diversaj tag- kaj vesper-manĝoj estas liberaj en restoracioj de la urbo, proksime de la hotelo aŭ de la salono Catherinette.



## **Aliĝilo** por la **81a Regiona Staĝo de Esperanto en Colmar la 19/20/21ajn de majo 2017**

| S-ro S-ino | Familia nomo | Persona nomo | Malpli ol 18 aŭ studento | Aliĝ-kotizo | Elektita kurso |
|---|---|---|---|---|---|
| 1 | ĉef-aliĝanto | | | | |
| 2 | kun-aliĝantoj | | | | |
| 3 | | | | | |

Adreso

Telefono: | Ret-adreso:

Mi pagas per ĉeko ☐ per ĝiro ☐ al André Grossmann CCP 819 34 U Strasbourg, per internacia ĝiro ☐ al nia peranto en Germanio ☐

Mi deziras ricevi mapeton por helpi la alvenon al la staĝo (krucumu) ☐

| **Nombro da tranoktadoj en la hotelo Primo Balladins inkluzive kun matenmanĝo** | Kosto por unu nokto kaj unu persono | Vendrede 19 | Sabate 20 | Dimanĉe 21 |
|---|---|---|---|---|
| **1 lita ĉambro** | 49 € | | | |
| **1 ĉambro en duobla geedza lito (por 2)** | 62 € | | | |
| **1 lito en 2 lita ĉambro** | 31 € | | | |
| **1 lito en 3 lita ĉambro** | 24 € | | | |
| **1 lito en 4 lita ĉambro** | 22 € | | | |

| | | | |
|---|---|---|---|
| **Vendrede** 19.05 14a ĝis 18a | Ekskurso D2: Fervoja muzeo Mulhouse (veturado per buso ekde la hotelo) | 22 € | |
| **Sabate** 20.05 14a ĝis 19a | Ekskurso D3: Kaysersberg, Riquewihr, Hunawihr-Ĝardeno de papilioj | 18 € | |
| **Lunde** 22.05 9a ĝis 19a | Tuttaga ekskurso kun tagmanĝo – **T1**: Strasburgo, Obernai | 40 € | |
| **Marde** 23.05 9a ĝis 18a | Haut-Koenigsbourg, Ribeauvillé, Hunawihr: Parko de la cikonioj kaj lutroj, sen tagmanĝo: restoracio surloke; ebleco pikniki | 35 € | |
| **Merkrede** 24.05 9a ĝis 18a | Eguisheim, Ungersheim-Ekomuzeo sen tagmanĝo; ebleco pikniki | 35 € | |
| | kotizo + tranoktoj. + Ekskursoj | Sume | |
| Pagenda | _________ + ____________ + ____________ | | |

# Provizora Programo:

## Vendrede 19-an de majo 2017

- 14a -18a **Ekskurso D2 – Fervoja muzeo Mulhouse**
- Poste Vespermanĝo
- 20a - 22 Kultura kaj dancvespero kun **Fernando** salono Catherinettes

## Sabate 20-an de majo 2017

- 9a Libroservo funkcias, Catherinettes
- 9a Vizito al la malnova urbo
- 09a - 12a E-kurso en la hotelo
- Poste Tagmanĝo
- 14a - 19a Ekskurso D3 – Kaysersberg, Riquewihr, Hunawihr - Ĝardeno de vivantaj papilioj
- 20a30 Kultura vespero - **Koncerto de Grazia Barboni**, Italio, en Catherinettes

## Dimanĉe 21-an de majo 2017

- 9a Libroservo funkcias, Catherinettes
- 9a - 12a **Ĉefa prelego kaj fakprelegoj,** salono Catherinettes
- 12a - 12a30 **Solena fermo**
- 13a tagmanĝo
- 14a30 komitat-kunsido de EFE

## Turismaj programoj

### Lunde 22-an de Majo

**9a – 19a Tuttaga kskurso – Strasburgo, Obernai**

### Marde 23-an de Majo

**9a - 18a**
Haut-Koenigsbourg, Ribeauvillé, Hunawihr: Parko de la cikonioj kaj lutroj, sen tagmanĝo: restoracio surloke; ebleco pikniki

### Merkrede 24-an de Majo

**9a - 18a**
Eguisheim, Ungersheim-Ekomuzeo sen tagmanĝo; ebleco pikniki

**Bonvolu sendi la aliĝilon kaj vian antaŭpagon al :**
André Grossmann
5, rue des Pyrénées
68390 BALDERSHEIM
**Ĉekoj nome de:** André Grossmann
CCP 819 34 U Strasbourg
**Internaciaj ĝiroj al: IBAN:**
André Grossmann
FR6920041010150081934U03669
**BIC:** PSSTFRPPSTR
**Por Germanio al nia peranto:**
je la nomo de: Hans-Dieter Platz. (menciu la celon de via pago)
Poŝtĝirokonto:
918 56-676 (BLZ 545 100 67) PGA Ludwigshafen
**Pliaj informoj ĉe André Grossmann:**
andreo.ag16@free.fr
Tel. 03.69.54.46.93
poŝtel. 07.82.21.97.34

# Aŭstria Nacia Biblioteko

Ni ĝoje atentigas vin pri la nova retejo de la Kolekto por Planlingvoj kaj la Esperantomuzeo de la .

Kolekto por Planlingvoj: http://www.onb.ac.at/eo/bibliothek/sammlungen/kolekto-por-planlingvoj/

Esperantomuzeo: http://www.onb.ac.at/eo/museen/esperantomuzeo/

Pli mallongaj tekstoj, pli da bildoj kaj konciza strukturo zorgu, ke vi facile kaj rapide ricevu deziritajn informojn, kiujn vi bezonas por viaj laboroj en la biblioteko aŭ por via vizito en la Esperantomuzeo.

Ĉi-kune mallonga superrigardo pri la plej gravaj ŝanĝoj:

- La retejo estas plibonigita, por ke vi povu klare legi ĝin sur diversaj iloj kiel (poŝ)komputiloj, tabulkomputiloj kaj saĝtelefonoj.
- Pro la nova menuo vi atingas pli facile la diĝitajn dokumentojn de la Kolekto por Planlingvoj kaj de la Esperantomuzeo – librojn, periodaĵojn, dokumentojn pri la Universalaj Kongresoj de Esperanto kaj pri la unua mondmilito.

Libroj: http://www.onb.ac.at/eo/bibliothek/sammlungen/kolekto-por-planlingvoj/digitaj-dokumentoj/libroj/

Periodaĵoj: http://www.onb.ac.at/eo/bibliothek/sammlungen/kolekto-por-planlingvoj/digitaj-dokumentoj/periodajoj/

Universalaj Kongresoj de Esperanto (1905-1939): http://www.onb.ac.at/eo/bibliothek/sammlungen/kolekto-por-planlingvoj/digitaj-dokumentoj/universalaj-kongresoj-de-esperanto/

Unua mondmilito: http://www.onb.ac.at/eo/bibliothek/sammlungen/kolekto-por-planlingvoj/digitaj-dokumentoj/unua-mondmilito-1914-1918/

- Sur la hejmpaĝo vi baldaŭ povos vidi interalie novaĵojn kiel novajn dokumentojn (ekzemple antaŭ- kaj postlasaĵojn en la Esperantomuzeo) kaj scienca blogo regule informas pri interesaj temoj rilate al Esperanto, planlingvoj kaj interlingvistiko.

Scienca blogo: http://www.onb.ac.at/forschung/forschungsblog/

Ni kore invitas vin viziti nin, ĝuu la foliumadon!


Korajn salutojn kaj bondezirojn,



Mag. Bernhard Tuider
Teamleiter
Sammlung für Plansprachen und Esperantomuseum
Österreichische Nationalbibliothek
Palais Mollard, Herrengasse 9, 1010 Wien
Tel.: (+43 1) 534 10-731
Fax.: (+43 1) 534 10-733
E-Mail: bernhard.tuider@onb.ac.at
Internet: www.onb.ac.at
FN221029v
FBG Handelsgericht Wien
Postanschrift: Österreichische Nationalbibliothek
Josefsplatz 1, Postfach 25, 1015 Wien

Jen kortuŝa rakonto pri la travivaĵoj de Carlo Nicolodi, en malfacila periodo, kiam en Eŭropo furiozis la dua mondmilito.
Lia patro Arturo, itala esperantisto, kaj Vera, latva esperantistino, ja konatiĝis koresponde pere de Esperanto kaj geedziĝis en Italio, sed la Dua Mond-milito ilin disigis kaj ilia bebo Carlo iĝis Kārlis en Latvio, dum la patro estis malliberulo en nazia lagero. Nur plurajn jarojn post la milito Kārlis iĝis denove Carlo en Italio. Sekvis plenkreskula vivo en Germanio kaj Svislando.

La edzino de Carlo, Anne-Lise Nicolodi-Nielsen, danino kaj esperantistino, iniciatis la eldonadon de tiu libro en la germana kaj dana lingvoj.

Tiam Edmond Ludwig leginte la libron tuj ekhavis la emon ĝin traduki al Esperanto.
Tial ni nun povas proponi al vi la Esperanto-version de tiu libro eldonita de la asocio Esperanto-France-Est.



La libro estas mendebla ĉe:
André Grossmann,
5, rue des Pyrénées
68390 BALDERSHEIM

Mulhouse Esperanto
CCP 19684 F Strasbourg

92-paĝa libro je 11 €
Afranko
en Francio 2,80 €
al Eŭropo 1 €

Sylvie REFF, fama nuntempa alzaca poetino, verkis en sia regiona alzaca dialekto rakonton titolitan Der Zopf (La harplektaĵo). Jen la komenciĝo de la rakonto.
La kovril-paĝan ilustraĵon realigis nia samideano Armand HUBERT.

Jen rakonto pri mia najbarino
87-jara kamparanino
7 gefiloj, forpasinta edzo,
kuirejo kun stamfita tero,
posedis nur sian harplektaĵon
neniam ajn tranĉitan.
La 15-an tagon de ŝia restado
la Maljunulejo fortranĉis al ŝi ŝian
harplektaĵon ŝian langon/lingvon
ŝian vivon.
Jen ŝia vivrakonto
per virina hararo.




Eblas mendi ekzempleron ĉe nia kasisto je 2,50 eŭroj inkluzive kun sendkostoj.

# KOTIZOJ KAJ ABONOJ POR 2017-2019

La kotizo al Mulhouse-Esperanto inkluzivas sendon de nia loka bulteno Sud-Rejna Kuriero. La membreco estas rezervitaj al la departemento 68 kaj donas la rajton voĉdoni okaze de Membro-kunveno.

**Ekster la departemento ankaŭ eblas aboni nian bultenon SRK sen membriĝo al nia asocio.**

Jen ĉi-sube la kotizoj kaj la abonoj por la 3 venontaj jaroj.

| Jaro | Reta versio (pdf) | Papera versio | Kolora ekzemplero |
|---|---|---|---|
| 2017 | 5 eŭroj | 8 eŭroj | 15 eŭroj |
| 2018 | 5 eŭroj | 8 eŭroj | 15 eŭroj |
| 2019 | 5 eŭroj | 8 eŭroj | 15 eŭroj |

Eblas pagi per ĝiro al Mulhouse-Esperanto CCP 19684 F Strasbourg aŭ par ĉeko al André GROSSMANN, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM

Membroj de Esperanto-Societo Basel ne estas koncernataj per tiuj tarifoj.

# Nia Kalendaro 2016 - 2017

| | | |
|---|---|---|
| **Novembro**<br><br>**2016** | **4 ĝis 6**<br>**8 - 15 - 25**<br><br>**8 - 15 - 22 - 29**<br><br>**19 - 20**<br><br>**28** | Staĝo de Bavelo kaj EFE en Rastatt<br>Kursoj por progresantoj en Espace 110 de la 15a ĝis la 16a30 laŭ interkonsento.<br>Eble kurso por komencantoj en Espace 110 de la 18a ĝis la 19a30<br>Deĵorado en Ungersheim ĉe Ekologia foiro.<br><br>Verda fadeno laŭ propono de Jacques de la 19a ĝis la 20a30 la restoracio La Pataterie, rue de l'Aérodrome Rond-point de La Piscine - A35, 68170 RIXHEIM. |
| **Decembro**<br><br>**2016** | **2 - 9 - 16**<br><br>**6 - 13**<br><br>**10** | Kursoj por progresantoj en Espace 110 de la 15a laŭ interkonsento.<br>Eble kurso por komencantoj en Espace 110 de la 18a ĝis la 19a30<br>Zamenhof-festo en La Forge, programo en ĉi-tiu numero |
| **Januaro**<br><br>**2017** | **6 aŭ 10**<br><br>**13 - 20 - 27**<br><br>**30** | Ni kune festu la 3-reĝojn en Espace 110 de la 18a30 ĝis la 20a.<br>Kursoj por progresantoj kaj komencantoj en Espace 110 de la 15a laŭ interkonsento.<br>Verda fadeno laŭ propono de Jacques de la 19a ĝis la 20a30 la restoracio La Pataterie, rue de l'Aérodrome Rond-point de La Piscine - A35, 68170 RIXHEIM. |
| **Februaro**<br><br>**2017** | **10**<br><br><br>**3 - 10**<br><br><br>**27** | Nia grupo Mulhouse-Esperanto kunvenas por la Ĝenerala asembleo en Espace 110 de la 18a30 ĝis la 20a<br>Kursoj por progresantoj kaj komencantoj en Espace 110 de la 15a laŭ interkonsento.<br>Verda fadeno laŭ propono de Bertrand de la 19a ĝis la 21a en restoracio "Hotel-Restaurant Porte de France", 94 avenue de Bâle, Saint-Louis |

Sud-Rejna Kuriero aperas kvaronjare.Ĝin redaktas por Esperanto-Societo Basel: Hanspeter SENN, Paradieshofstr. 164, CH-4054 Basel kaj por Mulhouse-Esperanto: André Grossmann, 5,rue des Pyrénées, FR-68390 Baldersheim.
Ĝin eldonas Mulhouse-Esperanto.







# Aŭtunaj koloroj en la vitejoj

